

kaj la mondon denove en krizon, kaj estas antaŭsignoj kiuj kredebligas ke eble ankoraŭ en ĉi tiu jaro.

<sup>3)</sup> Kvankam realigo de la proponoj de Gesell sendube malsuprenigos ĝis nulo aŭ eĉ sub nulon la malsupran limon de la poo de interezo (rentumo) determinitan de la kvalitoj de la *mono*, kaj tiel ebligas ke iom post iom la poo de interezo reduktiĝos al nulo, ĝi per si mem ne nuligos la poon de interezo, kiu ja ankaŭ dependas de la (mal)abundeco de la kapitalo. Kaj la monreformo ankaŭ ne malebligas ke — almenaŭ dum kelka tempo — iuj investoj liveros pli altan procenton, kiel okazis ĉe la Bagdad-fervojoj.

007.008.04

342.25

## LA HAVADO DE LA GUSTA MEZURO

de s-ino E. V. HATTERSLEY (Britujo),

kun permeso de la aŭtorino tradukita de la redaktoro el „*Practical Aspects of Social Credit*”, eldonaĵo de la Socikredita Kunordiga Centro, Mexborough, 1951.

Antaŭ multaj jaroj mi legis eseon de profesoro Haldane, titolitan „*On Being the Right Size*” (Pri Gustmezureco). En tiu eseo Haldane montris kiel la gigantaj kreaĵoj el antaŭhistoriaj tempoj estis ĝustmezuraj en la cirkonstancoj tiutempaj, kiam la varma malseko stimulis la egan kreskon en la praaj arbaroj kie ili nutriĝis. Sed ili ne plu estis ĝustmezuraj en malpli varma mondo kun malpli abunda disponigo de nutraĵo. Tiaj kreaĵoj, nekapablaj sin adapti, malaperis.

Sekvis tion ekzamenado de la mezuroj de diversaj kreaĵoj hodiaŭaj, kun klarigoj kial la anoj de ĉiu unuopa specio, vivantaj sub similaj kondiĉoj, emas atingi, meze, proksimume tiun mezuron kun kiu ni konas ilin. Por la celoj de iliaj vivoj ili estas ĝustmezuraj, kaj la Naturo zorgas pri tio, ke ili restu tiaj.

Koncerne la homon, Haldane ekzamenis la fabelojn pri la rasoj de gigantoj kaj grandeguloj vivintaj, laŭ tiuj fabeloj, en tre malproksimaj tempoj laŭ manieroj pli noblaj ol estas niaj hodiaŭaj vivmanieroj. Li montris ke kia ajn giganto du kaj duonan metrojn longa nepre estus invalidulo, kiu ne povus stari ne tuj renversiĝante. La aranĝo de la homa korpo neniel povus subteni strukturon el karno, sango, ostoj kaj tendenoj 2.5 m longa en rektstara pozicio. La fortega giganto desegnita en la porinfanaj libroj, kun Fingruleto sur sia manplato, estas mehanika neblajo.

Malfeliĉe, dum la Homo mem, koncerne la nombron de la centimetroj de sia longo, estas limigita de la Naturo, kaj tial ĝenerale atingas proksimume la ĝustan mezuron, ne ekzistas tia aŭtomata kaj bonfara diino gardanta pri la kreaĵoj de la senripoza cerbo de la Homo. La origina instigo al la homoj pliigi la efikecon de sia laboro per kunlaborado en grupoj por havigi al si la materiajn bezonataĵojn ŝajnas neĉesipova. La grupoj ariĝis en pli grandaj or-

ganizajoj, ĉi tiuj organizaĵoj siavice kunfandiĝis je trustoj kaj monopolaĵoj, kaj, antaŭ la milito, la apartaj naciaj monopolaĵoj rapide kuniĝadis en tutmondajn kartelojn kiuj sin rigardis kiel ekster kaj super la ŝtataj registaroj. Ĉi tiu ideo ke la pli granda estas nepre la pli bona, disvastiĝis de la kampo de la produktado al tiuj de Komunuma Regado, de Nacia Prizorgado de Saneco, de Instruado kaj Edukado.

En ĉiu etapo de ĉi tiu disvolviĝo la unuopa homo forcedas iom pli de sia dispono pri fina decido, kaj per kaj pro tio perdas iom de sia mensa staturo. Kiu prenas la respondecon de li forprenitan? Parto iras al la gvidanto de la grupo, parto al la estroj de la organizaĵo kies parto la grupo estas, kaj tiel la supro regas la tutan politikon kaj lasas al la ĉefoj de la unuoj el kiuj ĝi iras por esti farata. Kaj ju pli granda estas la fina organizaĵo, des pli plene la supro regas la tutan politikon kaj lasas al la ĉefoj de la unuoj el kiuj ĝi konsistas, respondecon nur pri la plej aŭtomata ĉiutaga rutino.

Ja mensaj gigantoj efektive devas esti tiuj, kiuj estras la potencajn organizaĵojn kiujn la Homo, kvazaŭ malgraŭ si, ŝajne ne povas ne konstrui! Ĉu ili vere estas? Kiu metis ilin tien? En kiuj ekzamenoj por provi ilian taŭgecon por la oficoj kiujn ili tenas, sukcesis ili? Ĉu ne estas pli verŝajne ke ili simple alvenis tien pro sia propra potencavido, helpite de la najloj en la plandumoj de siaj botoj, kaj de la akreco de siaj kubutoj?

Efektive, la homoj kiuj sukcesis atingi la hodiaŭajn regajn poziciojn ne multe diferencas, kaj malofte estas pli dotitaj per talentoj ol ni, krom en unu rilato: ke il amas potenco. Tamen, por fari la mil kaj mil gravajn decidojn kiujn ĉiu tago postulas de ili, surbaze de donitaĵoj senditaj de malproksime kaj pro neceso mallongigitaj kaj koncizigitaj, koncernantajn eble tipon de persono fremdan al ili, vivantan kaj laborantan en cirkonstancoj kiujn povas koni kaj kompreni nur tieuloj, bezoniĝas superhomoj. Fakte, la pli multaj el la decidoj farendaj estas farataj per simpla ekzamenado de tio, kion oni faris la lastan fojon en simila kazo, sekvata de sama faro. Estas malfacilege enigi novan ideon en ĉi tiujn tre kompleksajn, el malproksima supro regataj organizaĵoj.

Ĉu ekzistas ia speciala kialo por tiu ĉi ega elefantiazo en nia socia kaj industria vivo? Mi ne kredas, ke mi troigas la analogiigon, komparante nian financon sistemon kun la glandoj kiuj en la homa korpo stimulas kreskon, kaj kiuj, se malsanaj, povas kaŭzi monstran kreskon. Kun la disvolviĝo de la industria erao, la fluo de mono pli kaj pli direktiĝis al la disvolvo de la granda, kaj ĉiam pli granda unuo, kaj atingis la malgrandajn entreprenojn ĉiam pli malfacile. La entreprenon de la malgranda aferisto eble konas, kiel kontentige sanan, lia loka bankestro; ĝi ne estas, tamen, sufiĉe granda por ke estu informita pri ĝi la banka ĉefoficejo. Kiam mono por esploro kaj disvolvo estas bezonata, sendube ĝi iros al tiu entrepreno — aŭ ĉeno de entreprenoj — kiu havas tutnacie konatan nomon. Sendube en tempoj de ne-

sufiĉa efika demando — kaj tiaj estas neeviteblaj en nia nuna sistemo — entrepreno vaste disbranĉiginta povas dividi siajn financajn streĉojn kaj premojn pli bone ol tiu et-entreprenisto „kun ĉiuj siaj ovoj en unu korbo”. Kaj kiam la stato de aferoj estas vere senespera, la entreprenego povas aranĝi grandskalan kapitalredukton kiu neniun mirigas aŭ konsternas. Post tio ĝi povos daŭrigi sian vojon kun ŝarĝo malplipezigita, kiel la laca mulo post kiam ĝi transnaĝis la riveron kun sia ŝarĝo da salo en siaj portokorboj. La et-entreprenisto ne havas alian alternativon ol bankroton kaj likvidon.

La decida konsidero en ĉio ĉi tio estis tute financa. La demando, kiu formo de organizo donis al la homoj la aĵojn kiujn ili vere deziras — kiajn, kiam kaj kie ili bezonas ilin — iĝis rigardata kiel malpleje grava. Spertaj psikologiistoj longe laboradis en la reklama fako, uzante siajn povojn de amasa sugestio por trompe kaj mensoge kredi al la publiko, ke tio kion ĉi tiaj mamutaj entreprenegoj povas produktadi kun malpleja peno kaj pleja profito, estas fakte tio, kion ĝi deziras.

La sama elefantiazo atakis niajn malgrandajn loĝadocentrojn. Por igi sian voĉon aŭdata en *Whitehall* „de kie la mono venas”, estas necese foroferi individuan liberon por fariĝi parto de pli granda administra distrikto. Oni forgesas ke la mono ja estis antaŭe ĉerpata el la poŝoj de la homoj, inklude de la propraj poŝoj, kaj transpagata al tiuj kiuj devus esti niaj servistoj en la elspezo por nia bono. Tiel anstataŭ ke la vilaĝaj precipuloj decidas kie estu metataj la vilaĝaj lanternofostoj, iu sinjoro en *Whitehall* decidas por ili.

Post kiam tiel okazadis dum kelka tempo, oni povas konstati ke la vere juĝkapablaj homoj en la loko, ne plu emas kandidatiĝi por elekto en la Komunumajn Konsilantarojn. Ĉiu kompetento decidi kaj agi, kaj tial ĉiu digno, estas forprenita de la Komunumaj Estraroj. La Konsilantaroj povas disponi pri malpli kaj malpli da mono, kaj oni ripete aŭdas el la buŝoj de inteligentaj viroj kaj virinoj, ke ili havas plibonon por fari, ol funkcii kiel stampilo por *Whitehall*.

Ĉi tio ne estas troigita bildo. Nur antaŭ kelkaj tagoj la urbo *Sheffield* devis, laŭ ordono de *Whitehall*, anstataŭigi iun „Haltu antaŭ alvenota ĉefa vojo”-signon per „Malrapide ĉe alvenota ĉefa vojo”-signo, ĉar „estas la politiko de la Ministrejo havi laŭeble, malmultajn Haltu-signojn”. Pri la Haltu-signo decidis, post matura konsiderado, la homoj kiuj vivas en la urbo kaj trafikis en ĝiaj stratoj ĉiutage. Sed ili estis senpovaj kontraŭ la ordono de *Whitehall*. Oni pensus, ke, dum *Whitehall* povu emfaze konigi sian starpunkton rilate al „Haltu-signoj” antaŭ la lokaj aŭtoritatoj, la fina decido, interne de la urbaj kaj komunumaj limoj, estu ĉe tieuloj.

Alia ekzemplo: la estroj de la lernejoj administrataj de iu Graflando ne plu rajtas disponi pri kia ajn „malgranda kaso”. Iu lernejestro telefonis al la graflanda estrejo por akiri permeson mem aĉeti sialoke botelon da antiseptaj. La permeson oni rifuzis, kaj oni sendis taksion de la graflanda estrejo kaj returne (kune ĉirkaŭ 65 km) por alporti botelon da antiseptaj.

Kiam klaso en la botanika leciono devis disseki kelkajn manplenojn da bruselaj brasiketoj, oni devis mendi ilin ĉe la graflanda aŭtoritato por edukaj aferoj kelkajn monatojn antaŭe, kaj devis plani la lecionojn tiel, ke la vico estu al la brasiketa leciono en la tago kiam la legomoj estos liveritaj. Al lernejestroj, kiel ŝajnas, estu konfeditaj la zorgo por kaj la influado de centoj da infanoj, sed ne la dispono pri la plej etaj sumoj da publika mono.

Ŝajnas ke iu lernejestro senrajte alproprigis al si lernejan monon. Sed kiam pli bone ke li havu la eblon tion fari, kaj estu, post malkovro de la misfaro, forigata el sia pozicio!

Kun la alcentrigo de la mono neeviteble venas la alcentrigo de la dispono pri ĉi tiuj monoj kaj, preskaŭ ĉiam, mortiga insistado pri unuformeco. En Kimrujo la Urba Konsilantaro de Prestatyn forte malsimpatias kontraŭ „fermitaj” malsanulejoj — en kiuj la ordinara familia kuracisto ne rajtas trakti siajn pacientojn, kiu rajto estas rezervita por la kuracisto de la malsanulejo —, kaj akceptis rezolucion en kiu estas petate pri enketo pri la „fermitaj” malsanulejoj de la regiono. Ĉi tiun rezolucion oni transdonis al la koncerna Komitato pri Malsanuleja Administrado, sed la „Medicina Oficiro Prisana” deklaris, ke, kvankam oni petis ke la „War Memorial Hospital” en Rhyll estu „nefermita” malsanulejo, kie la malsanuloj povu esti traktataj de sia propra hejma kuracisto, se tiel ili deziras, oni rifuze respondis, „ĉar tio ne estus laŭ la politiko de la Ministrejo”.

Ĉi tiu ekzemplo eble ne tre trafas nin, sed kiu ne estas profunde trafita pro la volata pereigo de tiu belega ekzemplo de esplorserĉado pri la fundamentaj bazoj de saneco, entreprenitaj en *Peckham Health Centre* (Sanocentro de Peckham)? Tiuj kiuj apartenis al la Centro pagis iun kotizon por regula kuracista kontrolo de la tuta familio. Sed kun la veno de la Nacia (Kontraŭmalsana) Asekuro ili ne povis pagi kaj por Porsaneca Servo, kaj por Kontraŭmalsaneca Servo. La Ministro rifuzis kiun ajn subvencion al la Sanocentro de Peckham por ebligi ĝin daŭrigi sian esplorserĉan laboron, escepte se ĝi pretus akcepti diversajn kondiĉojn, pri kiuj la sociologiistoj fondintaj la centron kaj laborantaj tie, sciis, ke ili rekte tratranĉus la liniojn mem, laŭ kiuj disvolviĝas iliaj esploroj. Rezulte de tio, la Peckhama Centro, — antaŭ la milito la socia klubo de centoj da feliĉaj familioj, rigardantaj ĝin kun la plej kortuŝa dankeco kiel la fonton de siaj nunaj feliĉoj kaj sano — nun estas „transprenita” de la Ministrejo *Prisana* por esti transformata en Superklinikon por traktado de malsanoj je kosto de £ 63 000 plus pliaj £ 62 000 por pligrandigoj kaj ŝanĝoj. Nenia dubo pri tio, ke ili plenigos ĝin! Kiam la Konsilantaro de la Londona Graflando decidis aĉeti la konstruaĵojn de la Centro Sir Percy Harris protestis kontraŭ la devigo ĉesigi ĉi tiun rimarkindan kaj interesan eksperimenton. Ĝi devus esti daŭrigata kun la helpo de la Ministrejo *Prisana* kaj de la Londona Graflanda Konsilantaro. La prezidanto de la Komitato *Prisana* de la Londona Graflanda Konsilantaro respon-

dis, ke la Konsilantaro ne havas la kompetenton daŭrigi la laboron de la Centro laŭ la ĝisnunaj linioj, sed „nur laŭ la maniero proponita” de la Ministrejo Prisana.

En la vigla politika atmosfero en kiu ni vivis kiel ĝejnuloj, senfinaj diskutoj elverŝiĝis super niaj junaj kapoj. Mia patrino apenaŭ estis optimistino, sed rezoninte la aferojn kiel eble plej nigraj, ŝi havis kuraĝigan frazon, kiu forte konsolis min, longe antaŭ ol mi konsciis pri ĝia plena signifo. Jen ĝi estas: „Feliĉe ke nur malofte la aferoj disvolviĝas al sia logika fino”. Kaj mi trovis, plenkreskante, multan konfirmon de ĉi tiu eldiro. Ne estas facile dati tion, sed en la lastaj tridek jaroj ĉi tiu frazo pli kaj pli perdis sian verecon. Pli kaj pli ofte, antaŭ niaj teruritaj okuloj, ni vidas la eventojn marŝadi al ia aĉa fino, kiun neniu volas, dum tamen, neniu en la mondo ŝajnas kapabla fari ion por devii ĝin, eĉ se nur harolarĝe, de sia vojo.

Do kio en la pasinto malebligis ke la aferoj disvolviĝu al sia logika fino? Neniu pli nek malpli ol aktiva homa interveno, elvokata de la potenca konvinko de iu homo aŭ iu grupo de homoj, ke, kie temas pri homaj estuloj, homaj konsideroj devas superi ĉiajn aliajn. Ĉi tio ebligis ke nelogika ago deviiĝu moviĝon al logika, sed certe ne dezirata fino. Sed nuntempe, pro sia amplekso mem, preskaŭ ĉiu organizo fariĝis tiel nepersona, ke fariĝis preskaŭ ne ebla kia ajn interveno pro homaj motivoj. Kaj se laŭ la tuta longo de la linio de ebla agado al neniu estas donita sufiĉe da aŭtoritato por haltigi aŭ alidirekti la sinsekvon de la eventoj, estas multe pli verŝajne ke la aferoj disvolviĝas laŭ la tuta timiga ĉeno de kaŭzoj kaj rezultoj al fina neniigo.

La eraro de la malfido pri komuna saĝo, kaj de la trofido pri la mekanismo de la logiko, konsistas simple en tio, ke, por atingi la ĝustan konkludon per logikaj procedoj nepre necesas ke oni ekiru de ĝustaj premisoj.

Estas malĝojige facile ekfunkciigi la maŝinon de la logiko por la ellaboro de la konsekvencoj de malĝustaj premisoj, aŭ de aro da korektaj premisoj inter kiuj troviĝas unu falsa. Ĉi tio povas okazi pro multaj kaŭzoj: intence, fare de tiuj kiuj havas la potencon, por atingi kaŝitan celon, aŭ, pli verŝajne, pro ia konfuziteco de pensado. Estas afero de precipa graveco ke la progreso de la maŝino de la logiko estu daŭre kontrolata dum la tuta vojaĝo, por certigi ke ĝi liveru la rezultojn deziratajn por la unuopaj homoj. Mi ne povas vidi kiel niaj nunaj egaĉaj institucioj povos ebligi ĉi tion, se oni ne profunde aliigos ĝin.

Mi aŭdis homojn diri, ke ili kontraŭas la nunan sistemon pro ĝia nesuperbla nelogikeco. Mi ne konsentas. Mi opinias, ke, se ni akceptas la premisojn de kiu ĝi ekiras, ekzemple, en la kampo de regado — kiu nun havas en sia centro politikon de „plena eblo de dungaĝo” — jam nenio nelogika troviĝas, ekzemple, en tio, ke la lokomotivoj de la vagonaroj ŝarĝitaj per poreksporta karbo en Suda Yorkshire konsumas amerikan karbon, unue elŝipigitan en haveno de la eŭropa kontinento, kaj poste malgrandpoe retransportitan de

karbobarĝoj tien ĉi. Mi estas konvinkita ke ne estas saĝo en atakado kontraŭ la logiko de la nuna sistemo en kiu ajn el ĝiaj aspektoj. Estas la mortiga precizo de ĝia logika ellaboro de malĝustaj premisoj, kiu produktas la rezultojn kiuj tiom ofendas la komunan saĝon, kien ajn ni rigardas. Ni efektive estas buŝstopitaj kaj katenitaj se ni ne plu donas voĉon al la protestoj kiujn komuna saĝo diktas, simple pro tio, ke la rezultoj kiujn ni abomenas, estas atingitaj logikamaniere.

Guste pro ĉi tiu malfido pri grandskala kaj demalproksima aplikado de logiko al aroj da premisoj starigitaj kaj kompilitaj de eraremaj homoj, mi sentas min alarmita pro la disvolvado kaj perfektigado de pli kaj pli komplikitaj „elektraj cerboj”. La ŝarĝado de ĉiam pli da decidoj sur ĉiam malpli da ŝultroj nepre necesigis mallongigojn kaj „transsaltojn” en la pensado-procedoj. D-ro Norbert Wiener nun faris elektronajn cerbon ekipitan per „juĝpovo”. Ĝi kapablas precize analizi kunfiguraĵojn kaj reagi al ĝia tutaĵo, kio, oni diras, „iomete similas al la formado de koncepto fare de la homa menso”. Wiener antaŭvidas ke oni uzos tiajn cerbojn por funkciigi grandajn fabrikojn en kiuj laboros neniu homo, krom por kontrolado, kaj en tio li vidas la emancipiĝon de la homo for el laboregato. Tamen oni povas suspekti ke pli kredeble ĝi estos uzata por malplipezigi la ŝarĝon kaj kaŝi la mankojn de troalcentrigita potenco, eĉ en la kampo de la regado.

Tio kion mi diris ĝis nun, igas klare ke, laŭ mia opinio, la tuto de homa organizado produktas unuojn multe tro grandajn por sia celo, kaj antaŭmetadas al ni rezultojn kiujn ni ne deziras. La antaŭ-historia monstro, kiu ne povis sin adapti, malaperis. Ĉu niaj institucioj povas esti adaptataj? Kompreneble ili povas. La homa menso estas same kapabla projekti planojn de decentrigo, kiel tiajn de alcentrigo, se nur la volo tion fari, ekzistas. Jam antaŭ jaroj General Motors en Usono trovis sian organizadon tiom malfacilmova, ke novaj ideoj pri konstruo ktp. bezonis monatojn por efektiviĝi, kaj la firmego perdis multe da tereno en la konkurenco kun malpli grandaj firmoj. Ĝi trovis solvon en sindisdivido en grandan nombron da plene aŭtonomaj unuoj, kun maksimuma respondeco por tiuj kiuj plenumas la unuopajn partojn de la tuta tasko.

Mi sugestis ke nia hodiaŭa financa sistemo grandmezure respondecas pri la monstra kresko de niaj institucioj. Ĉi tiu grandaĉeco mem nun kredeble necesigas specialajn aranĝojn, sed mi ne povas vidi, kiel eblos efike fari ion kontraŭ ĉi tiu tuta disvolviĝo al pli grandaj unuoj, se ni ne samtempe atakas la financan sistemon kiu tiel ege emas favori la pli kaj pli grandan.

Ĉu iel ni povas fari ion pri tio? Kompreneble ni povas. La tuta direktado de la historio dum ĉiu minuto de ĝia iro estas decidata de homoj farantaj ion ĉu por malhelpi aŭ por akceli disvolviĝojn en certaj direktoj. En nia interpretado de la historio ni multe tro emas rigardi ĉiujn „tendojn”<sup>1)</sup> neevit-

<sup>1)</sup> trendo = la daŭra tendenco en iu disvolviĝo, (A. trend).

eblaj. Ni parolas pri tendro al pli granda mezuro de humaneco dum la pasinta jarcento, kvazaŭ ĝi estus io aŭtomata. Tiu tendro disvolviĝis nur pro la senlaca laboro kontraŭ plej obstina opozicio, kun flama indigno kiel mova forto.

Ni havas sufiĉe da aferoj kiuj interesu nin, kaj se ni sufiĉe interesiĝas, ni ne povas ne paroli prie. La Banko de Anglujo nun estas alŝtatigita. Kial ĝi timas sekvi kian ajn krom la rutinajn politikojn jam antaŭlonge provitajn kaj trovitajn maltaŭgaj? Ni devas igi tion sciata, ke se oni metas la monon en ĝian propran lokon en la kunaranĝaĵo de la aferoj, la trudo kombini kaj denove kombini, malaperus. Diru al viaj socialistaj amikoj ke alta grado de decentrigo neniel konfliktas kun publikproprajeco de industrio aŭ serventreprenejo kaj estas ĉe tiaj entreprenoj ne malpli ebla ol ĉe General Motors. Ne estas necese pretendi ke ŝanĝo de nia monsystemo per si sufiĉus por korekti la misaĵojn disvolviĝintajn dum unu kaj duona jarcento. Sed sen aliĝita monsystemo ne eblos daŭra direktoŝanĝo de ĉi tiu tendro al la pli granda kaj ĉiam pli granda, kiu havas siajn radikojn en la tuta hodiaŭa koncepto pri mono, laŭ kiu financa profito estas la sola rekonita mezurilo por sukceso aŭ malsukceso.

La fundamentaj bezonoj de la meza homo estas malmultaj kaj simplaj: propra hejmo, honesta nutraĵo havanta la nutrivon kiun ĝi ŝajnas havi, la dignon de krea laboro kiu postulas utiligon de ĉiom de la mensaj povoj pri kiuj li disponas, la kontentiĝon vidi la finitan rezulton de sia laboro. La potencaj senindulgaj monstregajoj kiujn oni nun konstruas por servi — laŭaserte — la bezonojn de la homo, donas al li ĉion **escepte** de la plenumo de ĉi tiuj fundamentaj bezonoj. Ĉie en la civilizita mondo viroj kaj virinoj atendadas dum jaroj por akiri propran tegmenton. La honesta nutraĵo, kian manĝis iliaj avoj, ne estas havebla, kaj tial obee ili glutas la anstataŭaĵon, kaj poste la ruĝajn aŭ verdajn miksaĵojn preskribitajn de la kuracistoj de la Nacia Sanoprizorgo. Ili havas la kinejojn, la radion, la televidon, idiotajn bildgazetojn, organizitajn piedpilkludajn vetojn, ktp. por plenigi la malplenon estigitan per la forpreno de kontentiga laboro. Ili ricevas zonan erupciaĵon (zostron), duodenaĵn ulcerojn, malignajn tumorojn, nervopriplendaĵojn de ĉiuj konataj kaj nekonataj specoj. Ilia ĉefa temo de konversacio estas malsano — ilia propra, aŭ tiu de iu alia. Ili kaj iliaj familioj treniĝadas tra la vivo en pasiva stato de subsaneco.

Ĉio ĉi tio povas kaj devas esti aliĝata. Ni konstruu mondon en kiu neniam denove homaj estuloj estu traktataj kiel senanimaĵo. Ĉi tiuj sistemoj elkreskantaj ĉirkaŭ ni, kun sia pli kaj pli nepersona sinteno al homoj kaj iliaj problemoj, estas kondamnitaj jam sole pro tio ke en ili ne estas loko por trakti homojn kiel vivantaj animulojn. Ni povas kaj volas ŝanĝi ĉi tiujn instituciojn, reduktante ilin al la ĝusta mezuro por plenumi sian funkcion de servado al la Homo, ilia kreinto, anstataŭ ol daŭre superregi ties spiriton en la nomo de Mamono, ilia vera mastro.

## PRI NIA LINGVA KRITIKO.

de Prof. d-ro IVO LAPENNA.

### I.

Ke nia literatura kaj scienca kritiko estas la malplej forta branĉo de nia tuta aktiveco sur la kultura kampo, tio estas pli-malpli ĝenerale konata. Nia „kritiko“ kutime (ne ĉiam, feliĉel!) limigas sin al mallonga resumado de la verko, al kvalitoj de la papero kaj bindo, al nombrado de preseraroj, al fina konkludo, ke la libro estos (aŭ ne estos) „bela ornamaĵo de ĉies biblioteko!“ La kelkaj esceptoj estas ankoraŭ tro kelkaj por povi iel ajn ŝanĝi tiun juĝon. Guste pro sia escepteco ili konfirmas la regulon.

Pri tio, tamen, mi ne deziras hodiaŭ paroli. La problemo estas vere tre grava kaj oni devos iam dediĉi al ĝi profundan kaj ampleksan studon, eble sub la titolo „Kritiko pri kritiko“.

Preskaŭ ĉiu recenzo pri Esperantaj verkoj entenas ankaŭ lingvan kritikon. Iam ĝi estis farata kun tre granda atento. La kritikanto bone studis la problemon antaŭ ol eldiri sian opinion. En la lastaj jaroj okazas ĉiam pli ofte, ke la recenzanto komprenas tiun sian taskon iom supraĵe. Ne malofte oni prijuĝas la lingvan valoron de iu verko ne el vidpunkto de la Fundamento, de la lingva tradicio kaj, eventuale, de la faktaj bezonoj pri la plua evoluo de Esperanto, sed pure laŭ siaj personaj gustoj kaj preferoj, kiuj havas nenion komunan kun la menciitaj kriterioj.

Kaj tio povas esti tre danĝera. Des pli, ke la legantoj ordinare estas pli inklinaĵi akcepti la asertojn de la kritikanto ol la lingvan principon, entenatan en la fakta uzado de iu formo fare de la aŭtoro. Se malantaŭ la aŭtoritato de la recenzanto troviĝas ankaŭ tiu de la revuo, en kiu aperis la kritiko, la tuta afero fariĝas ankoraŭ pli danĝera.

Guste tial mi decidiĝis — vere tre kontraŭvole — respondi al kelkaj prilingvaj rimarkoj de nia tre ŝatata amiko S. Pragano en lia recenzo pri mia verko „Aktualaj Problemoj“ (vidu S.R. n-ro 1/1952, p. 31—36).

Antaŭ ĉio mi diru, ke la recenzo apartenas al la supre aludita kategorio de esceptoj. La recenzinto, kun multe da konscienco, klopodis doni seriozan kritikon pri la verko. Tiu aprezado de lia laboro kompreneble ne signifas, ke mi kiel aŭtoro plene konsentas kun ĉiuj liaj diroj. Evidente, tia konsento estas absolute superflua.

Tamen, eĉ en tia altnivela kritiko enŝteliĝis kelkaj eraroj, el kiuj mi ne povas — almenaŭ pretere — ne mencii du ĉefajn:

1. En la libro mi diris, ke „la internacia juro rekonas la homajn rajtojn“. S. Pragano opinias, ke la artikolo „Ia“ (kursivigita de li mem) tute ne havas vivrajton tie, ĉar la Ĉarto de U.N. rekonas nur nerekte „la ekziston de homaj rajtoj“, do sen la artikolo. Li opinias, ke mia argumentado „elreliĝas“ ĝuste pro tiu nekorekte uzita „Ia“. Nu, la Ĉarto parolas pri la homaj rajtoj en la franca teksto de ĉiuj artikoloj cititaj en la koncerna parto de la libro.